

Vojaĝo al Kazohinio de Sándor Szathmári
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 774, 1978.08.10 & 12

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La du pasintajn seinajnojn ni prezentis al vi la vivon de Sándor Szathmári kaj raportis pri la graveco de tiu ĉi verkisto, kaj en la hungara, kaj en la Esperanta literaturoj. Hodiaŭ ni raportos pri la ĉefverko de tiu ĉi aŭtoro: "Vojaĝo al Kazohinio", resumante eseon de Mária Bereczki, studentino de d-ro István Szerdahelyi, studo aperinta en la dua kajero de la kolekto Esperantologiaj Kajeroj de la universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto.

A.- Sándor Szathmári komencis verki "Vojaĝo en Kazohinio" en la jaro 1935. Post plurfoja prilaboro kaj plibonigo la neordinara verko aperis nur en 1941 ĉe la hungara eldonejo « Magyar Élet », do en la hungara lingvo. Pro la mondmilita politika situacio la libro povis aperi nur en tre kripligita formo. La aŭtoro devis ellasi plurajn ĉapitrojn, interalie la priskribon de la *buku*, tio estas la milito kaj la konversaciojn pri la amo, kiujn Gulivero havis kun Zolema. Tiu ĉi parto estis kondiderita kiel pornografia. La dua hungara eldono aperis en 1946, same ĉe la eldonejo « Magyar Élet » en la originala formo, kaj en esperanto la romano aperis en 1958 ĉe SAT. Dum la libro ne elĉerpiĝis en la esperanta versio, kiu estas la originala, en la hungara tria eldono aperis en 1957 kaj kvara en 1972. "Vojaĝo al Kazohinio" estas konsiderata de la hungaroj kiel hungara literatura ĉefverko. La sama romano estas fakte neglektata de la esperantistoj. Bedaŭrinde por ili kaj malfeliĉe por la aŭtoro, kiu mortis antaŭ kvar jaroj sen esti ricevinta la gratuladon, kiun li meritis.

Cl.- La priskribo de la **buku**, kiel ni jam diris, estis malpermesita de la cenzuro. Aliajn strangajn vortojn oni trovas en tiu priskribo de vojaĝo de Gulivero ĉe la **hinoj** kaj ĉe la **beninoj**, interalie la du ĉefkonceptojn, **kazoo** kaj **kazi**. Ni ekzamenus, kio kaŝiĝas malantaŭ tiuj konceptoj **kazoo** kaj **kazi**, kiuj karakterizas la penson de la hina popolo, tio estas de de gento, kiu trovis manieron vivi logike, do laŭ la postuloj de la tekniko. La tekniko, la ellaso de ĉio emocia kaj personeca, donas al la hinoj multajn avantaĝojn, sed por tiuj ĉi avantaĝoj ili devis pagi, rezignante pri maldisciplinemo, konkursemo, pri personaj gustoj, pri konversaciemo kaj eĉ arto. Kiel diras la studentino Mária Bereczki :

A.- "En la unua parto de la interesa kaj surpriziga romano, ĉe la hinoj ni renkontas la efektivigintan komunismon en sia tuto. La materiala-teknika nivelo estas alta, evoluinta, la homoj estas tute liberaj.

Regas vera demokratio, demokratio laŭ la principo de egaleco. Ĉe la hinoj estas disciplino kaj harmonia vivo. La agadojn de la hinoj determinas la racio, kiu ĉesigas ĉian socian konstruaĵon, kiel la moralo, filozofio, politiko, religio, arto kaj literaturo.

Cl.- Por Gulivero tiu ĉi hina vivo fariĝos netolerebla. Li ne povas kompreni la hinajn ĉefkonceptojn "kazoo" kaj "kazi". Jen kiel la studentino de d-ro István Szerdahelyi prezentas kio estas **kazoo** kaj **kazi**; konceptoj netradukeblaj en aliajn lingvojn :

A.- "**Kazoo** signifas ian ĝeneralan justeman intencon. Ĝi estas severe matematika koncepto por la egaleco de la servado kaj reservado. Ekzemple, se iu, kiu faras pli malfacilan laboron, manĝas ankaŭ pli multe, tio estas por ili **kazoo**. Se iu tial manĝas pli multe, ĉar lia stomako deziras multe, ankaŭ tio estas **kazoo**. Se la malsanulo, kiu ne laboras, deziras pli delikatajn manĝaĵojn, ankaŭ tio estas **kazoo**. **Kazoo** estas la klara prudento, kiu vidas antaŭ si, laŭ

matematika rektlinio, kiam kaj kiel ĝi devas ion fari, por ke la individuo akiru la plej altan bonstaton por la socio. Do, racie dividi la laboron, ripozon, dormon, sporton, manĝadon, konduki al niaj homfratoj tiel, ke ĉiu produktu pli multe, tamen sen malutilo al la sano, tio estas **kazoo**. Se iu laboras malpli multe, ol li kapablas, tio jam ne estas **kazoo**, ĉar la mankanta parton devas plenumi alia, kiel pluslaboron. **Kazoo** havas ne individuan, sed komunan, ĝeneralan sencon: kio por aliaj ne estas kazoo, tio ne estas kazoo ankaŭ por mi. Kazoo havas nenian sentimentan karakteron. Ĝi ampleksas ĉion, eĉ la helpon al homfrato. Se estas necese, haltas la laboro de la tuta urbo por savi unusolan homon.

Cl.- La antitezo de **kazoo** estas **kazi**. **Kazi** estas ekzemple, se iu elprenas novan vestaĵon el la magazeno - en Kazohinio oni ne pagas en la memservaj magazenoj - kiam la malnova ankoraŭ estas uzebla. **Kazi** estas, se iu malhelpas la agadon de sia homfrato sen ia deviga kaŭzo, ekzemple superflue parolante pri temoj, kiuj nek al li, nek al la alia signifas ian utilon. En Kazohinio oni parolas nur por diri ion necesan. Literaturo, arto estas kazi, tio estas malhavinda.

A.- En **Kazohinio** ekzistas tri homklasoj: la **hinoj**, la **belohinoj** kaj la **behinoj**. **Hino** estas homo, kies konduto konformas al la tezoj de la **kazoo**.

Cl.- La mallertuloj estas nomataj **belohinoj**, kio proksimume signifas "neklera hino". Al tiu ĉi kategorio apartenas la infanoj kaj ĉiuj homoj, kiuj komencas novan profesion. Ili estas senditaj al lernejoj por esti edukotaj. Sed ne ekzistas devigo frekventi lernejon, ĉar ĉiuj havas konvinkiĝon pri la neceso akiri klaran cerbon, kiu ne faru **kaziaĵojn**. Ilia edukado radikale diferencas de la nia. Ĉe la hinoj lernejo estas laboratorio, kie oni akiras fizikajn, kemiajn, higienajn kaj teknikajn sciojn, kiuj igas la cerbon agi nur kazoe.

A.- Apud la hinoj kaj la belohinoj, tio estas la nekleraj hinoj emaj kleriĝi, estas la **beninoj**. Ili estas homoj, kiuj scias la natursciencajn efektivaĵojn sed kiuj tamen faras kaziajn aferojn. **Behino** estas homo, kiu laboras pli multe aŭ pli malmulte ol li povas, kiu formanĝas la manĝaĵon de la aliaj aŭ donas sian al alia, kiu neutile parolas, kiu konservis sentimentan vivon, ktp. Ili estas **nehomoj**. **Behino** signifas **nehomo**. La hinoj rigardas ia behinojn, kvazaŭ ili estus nehomoj, alispecaj naturkreaĵoj, kiuj devas esti apartigitaj. Ili ne havas la rajton aperi en la publika vivo. Ili fakte vivas en rezervejoj.

Cl.- La nomo de la lando, **Kazohinio** signifas, la lando de la homoj, kiuj konas la puran esencon de la homa estado, de la homoj, kiuj kondukas **kazoe**.

A.- La venontan semajnon ni vojaĝos en Kazohinio kaj ĉe la behinoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!